# NIA VOĈO

Madrida Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4ºB-EXT. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Ekde 1985 redaktas kaj eraras Lupe Sanz **NOVEMBRO 2009**

**Oni serĉas kandidatojn por la estraro de MEL**

*La estraro de Madrida Esperanto-Liceo ne deziras daŭri en siaj postenoj ĉar kredas ke aliaj pli junaj liceanoj devas alporti novajn ideojn. Pro tio dum la Ĝenerala Kunsido okazonta la 25-an de januaro oni devas renovigi la estraron. Antaŭ tiu dato oni akceptas kandidatojn ĉe* saluton@wanadoo.es

1an de oktobro, Pedro Hernández en esperanto-madride: mi povas preni neniun respondecon en MEL, ĉar mi jam havas tro da laboro en HEF. Estas bona momento por ke junaj homoj transprenu la estraron de MEL, kaj igu ĝin regiona asocio de Madrido.

Konversacia rondo MEL de la 5a Oktobro: Ĉeestis Carmen Suárez, Toño, Juan del Castillo, Miguel Hernández (de HEJS), Juan Trenado (estrarano de HEF), Andy Hernández kaj Darío. Oni pritraktis ĉefe la temon de la eventuala malapero de MEL se oni ne trovas kandidatojn por nova estraro.

Konversacia rondo 26ª de oktobro: Ĉeestis: Darío, Platas, Juan del Castillo, Toño, Lupe, Carmen kaj Francisco Ferreras, ĉiuj MEL-anoj. La afero ne estas regiona au najbara, estas ke unue MEL devas daŭri kiel asocio. Nun MEL havas 30 membrojn, la duono kun pli ol 60 jaroj kaj 8 kun pli ol 70; oni devas kapti junulojn. Kvankam nenio estas decidita, oni vidas lumon je la fino de la tunelo, oni informos kiam la datumoj estos konfirmitaj.

## EN HISPANIO

Ekde la 3a ĝis la 10a Oktobro en Pineda de Mar (Barcelono) **Angelita Sanz** partoprenis en la Internacia Semajno pri Kulturo kaj Turismo organizita de KAE. Ankaŭ Angelita partoprenis kune kun **Augusto** en la 42-a Konferenco de ILEI en Krakovo.

En Libera Folio aperas interesa artikolo de **Toño del Barrio** en kiu li analizas la frenezan kampanjon de usonaj ekstremdekstrecaj medioj kontraŭ Prezidento Obama kun la absurda preteksto ke li intencas trudi Esperanton al la usona popolo: http://www.liberafolio.org/2009/nobelpremiito-obama-akuzata-pri-esperantismo

En alia artikolo en la sama reta gazeto, Toño analizas diversajn pseŭdosciencajn artikolojn pri Esperanto lastatempe aperintaj en Interreto: http://www.liberafolio.org/2009/fantomaj-eseoj-hantas-la-reton

La 4an Oktobro okazis ekskurso al Monto Abantos (apud **Escorial**- **Madrido**). Partoprenis 20 plenkreskuloj, unu bebo kaj du hundetoj kaj ĝi estis sufiĉe internacia: unu belgo, unu germanino, unu rusino, unu kubano... eĉ vallekanoj!. Entute alvenis 11 ne esperantistoj, kiuj spertis kiel ni uzis la lingvon por interparoli, kaj demandis pri kial ni lernis e-on, ktp. En la pinto oni puŝis du e-flagojn.

En la numero 388 de Boletín aperas interesa artikolo de nia membro **Augusto Casquero** pri "Edukado en Ĉinio". Augusto instruas regule Esperanton kaj la hispanan lingvon en altlernejo de la ĉina suda provinco Guangdong.

TV-Madrid intervjuis al Alfredo Jiménez de la Librejo **Don Libro** de Madrido kaj eldonisto de GRAM Ediciones. Dum la intervjuo li montris la esperantajn librojn kiujn li eldonis.

**HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO (ne oficiale)**

Inter la 20a kaj la 31a de oktobro sukcese okazis **ekspozicio de paneloj** “El Esperanto: desafío a Babel” en Kultura Centro "Casa del Reloj" de la madrida distrikto Arganzuela.
http://www.esperanto.es/hef/index.php?option=com_content&view=article&id=210&Itemid=239

La materialo estas preta por pruntedoni al esperantaj grupoj. Temas pri 15 paneloj (1,00 x 0,70 m). Interesatoj kontaktu kun HEF: admin@esperanto.es

Angel Arquillos anoncis publike sian eksiĝon el la estraro de HEF kaj el la posteno de redaktoro de "Boletìn".

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ**

14ª-15ª de novembro en Málaga: 1ª Andaluza Esperantologia Semajfino. Organizita de AEU kaj KCE. esperantomalaga@hotmail.es . Entute ĝis nun anoncis sin jam dekkvino da personoj, preskaŭ ĉiuj el Andaluzio, sed ankaŭ el aliaj regionoj de Hispanio.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Niaj **konversacia-rondo**j okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

**Esperanto-kurso** gvidata de Pedro Hernández en la HEF-Oficejo en Madrido, strato Rodríguez San Pedro, 13, 3º, oficejo 7. La kurso okazas ĉiuvendrede inter 18.00 kaj 20.00.

16an de novembro je 18,30 “Vojaĝo al Baltaj Landoj” kun projekcioj.

**ZAMENHOFA TAGO 2009**

Pedro Hernández preparas **bankedon en restoracio de Vallecas**. Li necesas kiel eble plej frue scii ĉu iu intencas partopreni. Do, bv. anonci vian partoprenon, kaj ankaŭ ĉu vi preferas manĝi vegetare: esperantio@ono.es

Ĉi jare la momento estas tre speciala, ĉar temas pri la 150a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, kaj eble okazos aliaj eventualaj aranĝoj por aldoni al la bankedo. Dum la konversacia rondo de MEL (2009-10-05) oni sugestis aranĝi prezenton de la E-versioj de "Platero kaj mi" kaj "La origino de la specioj" aŭ organizi koncerton klasika kaj popa

**Memoru ke “NIA VOĈO” SERĈAS NOVAN REDAKTORON**

*******************************************************************************

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6-4ºB-EXT
28005 MADRID